

Projekto: 2023-1-RS01-KA122-ADU-000141195

Stipendikonkurso de Serbia Esperanto-Ligo kaj ILEI-RS

Se vi estas agema, interkulturema kaj scivolema, vi estas la ĝusta kandidato.

Serbia Esperanto-Ligo (SEL) kaj Serbia sekcio de ILEI (ILEI-RS) stipendios 12 partoprenantojn de trejnseminario, kiu okazos en Beograd, Serbio, 2024/08/17-24. Bonvolu diskonigi ĉi tion en viaj asocio, sekcio kaj ĉirkaŭaĵo. La seminario celas:

- Trejnadon al interkultura komunika kompetento (IKK)
- Instrulertigadon kaj trejnadon de interkulturedukantoj
- Instruspertigon por inkluziva edukado
- Aktivulan trejnadon
- Stimulon al partneraj projektoj

La seminarion subvencias: EU-programo Erasmus+, UEA kaj ILEI. La stipendio kovras restadkostojn (loĝado kaj manĝado) kaj maksimume 150 EUR de vojaĝkosto. Stipendiatoj mem pagas la bazan kotizon de 50 EUR.

La kondiĉoj por gajni la stipendion:

- Ĝisnuna kontribuo al lingva edukado kaj interkultura interŝanĝo
- Rekomendo de aktiva organizo en la celkampoj de la seminario, sendita elektronike al serbialigo@gmail.com, kopie al laslo.az@gmail.com
- Sindevigo plu aktivi en tiaj organizoj
- Sindevigo al plentempa partopreno en la seminario
- Komunikkapablo en Esperanto je la nivelo B1 minimume

Vi povas [aliĝi al la seminario](#) ankaŭ sen la stipendio kaj mem pagi la kostojn. La tutsemajna kotizo sumas 270 EUR kaj inkluzivas la loĝkostojn, manĝkostojn, unu ekskurson kaj ĉiujn programerojn de la evento enkadre de kiu okazas la seminario.

Por peti la stipendion, nepras plenigi:

- [La Aliĝilon](#)
- [La Stipendipetilon](#)

Se vi havas demandojn, skribu al:

serbialigo@gmail.com, kopie al laslo.az@gmail.com.

Bonvenon!



Serbia Esperanto-Ligo, Prezidanto Jovan Zarkoviĉ
Serbia sekcio de ILEI, Sekciestrino Aranka Laslo